

LA PROGRESO

ĈEĤOSLOVAKA ORGANO ESPERANTISTA. ★ ĈESKOSLOVENSKÝ LIST ESPERANTSKÝ

Aperas monate. Jara abono Kĉ 20.—, eksterlande Kĉ 25.— (por 10 numeroj). Specimen-numeroj Kĉ 2.— aŭ 2 resp. kuponoj. — Redakcio: Plzeň, Radyňská ul. 10. — Administrejo: Jos. Brožík, Plzeň, Prokopova tř. 9. — Konto de la Poŝta ŝparkaso ĉs. n-ro 5203, aŭstria n-ro 169.352. — Telefono 718/VIII. La manuskriptojn oni ne resendas.

ESPERANTISTA GAZETO POR ĈEĤOJ.

(Kelkaj rimarkoj al diskuto.)

Nia lasta ĉefartikolo vekis ĝeneralan intereson de nia legantaro, kiu rezultigis diversajn opiniojn kaj proponojn. Ni estas pretaj enpresi kelkajn kaj ni komencas per la jena, lasante al la aŭtoro respondecon por ĝia enhavo. — Redakcio.

Oftege mi pensadis, ĉu nun malgranda nacio bezonas specialan gazeton esperantistan. Mi substrekas la vorton gazeto. Kial? Multfoje en Esperantujo ekaperis »ankaŭgazeto«, kiu anstataŭ helpi, malfaciligis la movadon. Ni nun ofte aŭdas: Naciaj gazetoj malaperu. Por internacia movado sufiĉu internacia gazetaro. Ni ja havas la revuojn: Geneva »Esperanto«, »Sennacieca Revuo« kaj »Novaj Tempoj«. Nune komencis aperadi »Literatura Mondo«, bela literatura revuo. Kaj ili devus sufiĉi?

Laŭ mia opinio, nacia gazeto estas dezirinda.* Sed kia? Ĝi estu ne sole raportanto pri esperantista vivo kaj aperanto de pli malpli bonaj literaturaĵoj, sed ankaŭ — bona propagandilo inter samnacionoj! En ĝi devus esti kunligitaj (por ni) »La Progreso« eĉ »Esperantský zpravodaj«. Tiel abonantoj posedus ne sole gazeton, sed ankaŭ gravan propagandilon. Kaj sur la ne lasta loko: nacia asocio havus propran organon.

Lernu ĉiam de germanoj. Vidu la germanan »Esperanto Triumfonta«, »Germana Esperantisto« kaj ĉe ni »La Marto«! Nin precipe interesos »La Marto«. Permesu al mi la demandon: Ĉu pli multe da legantoj havas »M.« aŭ »L. P.«? Ŝajnas al mi, ke »M.«! Kaj due: Estas pli multaj ĉsl. esperantistoj ol germanaj? Eble jes. Kaj nun konsideru: Se malaperus »La P.«, ĉsl. samideanoj parte aliĝus al »La M.«, parte al »E. T.«. Sed tiuj estas por germanoj, kaj liberan lokon por kroniko ili disponigas al germanoj! Kaj la »Esperantský Zpravodaj«? En ĝi mi ĉiam legas — mal-

novaĵojn. Mi ne ofendas ŝatindan f-inon Supichová, kiu faras por ni ĉion eblan. Mi sole petegas: Se tio estas ebla, kunligu »E. Z.« kun »La P.«. Tia komuna laboro plifaciligus ambaŭflanke pliriĉigon. Kaj ni, ĉsl. Esperantistoj, posedus la veran gazeton, ŝatindan ankaŭ ĉe kontraŭloj ĉiufankaj!

Mi imagus la gazeton ĉsl. iomete similan al »La Marto«. Preferinda estas formato pli grandigita kaj presejo en pli malbonvaluta lando. ĈAE. (se ili interesus) posedus kovrilan paĝon por siaj raportoj. Ĉiu grupo devige abonus oficialan organon, kaj organizitaj Esperantistoj ricevadus, post antaŭa pago (ekz. 10 Kĉ) por presa fondo, gazeton je malaltigita prezo.

Kaj fine: abonu internaciajn revuojn, kiuj reprezentas nin antaŭ la mondo, sed ankaŭ ne forgesu vian ligilon kun via nacio. Dum orientbohema laborkunsido oni rekomendis »E. T.« por ni! Sed ne forgesu, ke ĉi tiu gazeto estas porgermana. Ne politike, sed praktike. Ĝi povus esti rapida raportilo pri aktualaĵoj, sed neniam gazeto (resp. ĵurnalo) aboninda por ĉiu Esperantisto. Tia okaze devus aperi nova sento en »E. T.«, kiu bedaŭrinde ĝis nun dormas.

Ĉi tiuj vortoj nenion kaj nenion atakas. Ili estas sole persona opinio kaj mi estus tre dankema, se ili estus malpravaj. Do, kontraŭstaru. Precipe vi, el ĈAE., nune estas la tempo diri vian opinion. Kio estas farebla hodiaŭ, ne fordonu al morgaŭ! Bobe.

Rimarko: Konsideru, ĉu »La P.« ne povus fariĝi ligilo por malgrandaj gentoj slavaj. Tiel efektiviĝus tiel sopirata »Slava revuo«.

oooo

KOMERCA KONFERENCO EN VENEZIA

2—4 aprilo 1923.

Provizora programo.

London matene je 10. horo: Malfermo de la konferenco en la sidejo de la Venezia Komerca Ĉambro (Camera di Commercio), Spertoj faritaj. Raportoj de la Foiroj.

*) Vidu: »Litova Stelo«, »Finnl. Esp.« ktp.!

Mardon: Rimedoj por akceli komercan uzadon kaj instruadon en komercaj lernejoj.

Merkredon: Uzo en Turismo. Eldono de gvidlibroj kaj gvidfolioj, ĝeneralaj rekomendoj kaj konkludoj.

Jam dimanĉon vespere okazos en Hotel Wagner-Lido familia kunveno por interkonatiĝo. La tutan laboron oni esperas fini merkredon vespere. Jaŭdon matene okazos parolado de S-ro Pitlik kun lumbildoj kaj filmoj pri Ĉeĥoslovakio en kinematografejo.

Dum la vesperoj okazos diversaj festkunidoj kun helpo de la lokaj samideanoj. Definitiva programo estos disdonata al la konferencanoj ĉe alveno.

La konstanta sekretario de la konferenco sidos en Hotel Wagner-Lido, kie loĝos plej multaj partoprenantoj. Ĝi estos malfermata jam sabaton antaŭ Pasko.

Rabato sur itala fervojaro.

Dank' al afablaj klopodoj de la Itala Federacio, la Itala Fervoja Direktejo konsentis rabaton al partoprenantoj je la konferenco. La rabato valoras de 25. marto por iro ĝis 9. aprilo por reveno kaj kalkulos 40—60% laŭ la nombro de kilometroj sur itala teritorio. Por akiri la rabaton kaj mendi la taŭgajn biletojn ĉe italaj agentejoj eksterlande oni bezonos plenigi certajn dokumentojn, kiujn afable sendos tuj al ĉiu petinto la Prezidanto de l' Itala Federacio, S-ro advokato Attilio Vaona, St. Egidio 6, Verona, Italio, kondiĉe ke oni sendu al li sian adreson senprokraste.

FELIETONO

PRI NIA VIZITO AL PLZEŜ.

Ni vojaĝis triope al Plzeň, por viziti niajn korespondantojn, kiuj nin promesis dum la Prahaa Kongreso, montri al ni la belajn vidindaĵojn de ilia urbo. Traveturante Germanujon ni atingis la limurbon Eger. Baldaŭ ni troviĝis inter homoj, kiuj parolas tian strangan lingvon, ke ni tute ne povis kompreni ion. Sed la pejzaĝoj laŭlonge de la fervojo estis tiel belaj, ke ni ne havis intereson nin okupi pri la Ĉeĥa lingvo kaj la vortareto Esperanto—ĉeĥa restis en nia poŝo.

Jen kontrolisto envenis nian kupeon kaj petis la biletojn. Rimarkante la verdan stelon sur niaj jakoj, li diris: Vi aspektas kvazaŭ vi estas Esperantistoj! Kompreneble ni tuj nur vidis la kontroliston kaj ne plu atentis la belajn pejzaĝojn. Ni interparolis dum kelkaj horoj, kaj alveninte en Plzeň, li rapide finis sian laboron kaj invitis nin kuniri al sia domo, por interkonatiĝi kun sia edzino.

La akcepto tie estis vere neatendita. Ni tuj rimarkis, ke s-ino Kubásek ankaŭ estis tre bona, afabla esperantistino kaj kompreneble ankaŭ bona gastigantino. Post kelkaj horoj s-ro Kubásek nin kondukis vagonare al Doubravka, tiu vilaĝo estis la celo de nia vojaĝo kaj estas apud Plzeň. Post nia alveno en la domon de nia amiko Hes, li estis tute surprizita, ĉar, pro la fakto, ke nia karto

Aliĝoj.

Ĝis la 25. februaro estis aliĝintaj al la konferenco la jenaj organizaĵoj:

Internaciaj foiroj de Barcelona, Basel, Bordeaux, Frankfurt, Leipzig, Milano, Paris, Padova, Praha, Reichenberg.

Komerciaj ĉambroj de Gagliari, Mantova, Padova, Pisa, Potenza, Sienna, Venezia (Italio), Braila (Rumanio), Budapest (Hungario), Lausanne, Sion (Svislando), Brno (Ĉeĥoslovakio), Lure, Niort, Nimes Thiers, Tarare (Francio), Bradford (Britlando), Sacramento (Usono), Bologna (Italio), Hradec Králové (Ĉeĥoslovakio).

Eksterlandaj komercaj ĉambroj: italaj en Belgio, Egipto, Svislando, Tunisio, Sudano, Maroko, franca en London, nederlanda en Italio, itala en Rosario di Santa Fe (Argentina Respubliko, Sud-Ameriko).

Asocioj: Ĝenerala Konfederacio de meblarto (Franca), Societo por mondkomerc kaj mondlingvo (Wien), Respublika Komitato por Komerc, Industrio kaj Agrikulturo (Paris), Rotary-Klubo (Harrogate), Svisa Centra Turisma Oficejo (Zürich), Oficejo por Industrio (Svisa).

Ekspozicio. La tutan materialon (esperantaj prospektoj, afiŝoj, gvidlibroj ktp.) oni sendu al la organizanto S-ro Giovanni Bonini, S. Angelo, calle Avvocati, 3901 A, Venezia, avertante lin per poŝtkarto.

Kotize. Por ebligi eldonon de taŭgaj raportoj pri la konferenco, estis necese fiksi kotizon por ĉiuj partoprenantoj. Ĝi estos mal-

ankoraŭ ne atingis lin, li ne sciis, ke ni jam alvenis. Sed malgraŭ tio li nin akceptis tre kore kaj baldaŭ ni denove devis manĝi kaj trinki. La saman vesperon ni vizitis la konversacian kunvenon kaj tie ni renkontis niajn amikojn de la Prahaa Kongreso.

Baldaŭ la kunveno estis fermita kaj ili kondukis nin al la Laborista Domo, kaj en unu el la salonoj ni festis gaje. Ni kantis kaj trinkis bieron, parolis kaj ĝuis.

Malfrue ni iris hejmen kaj malgraŭ ni petis konduki nin al hotelo, ili rifuzis kaj postulis, ke ni dormu en ilia domo. Kompreneble ni baldaŭ estis venkintaj, ĉar estas pli agrable dormi ĉe personoj, kiuj povas kompreni vin ol dormi en hotelo, kie neniu povas kompreni ĉu ni petas glason da akvo aŭ subrosilon.

La duan tagon la vetero aspektis bone kaj post matenmanĝo, ni, akompanataj de du ĉeĥaj amikoj, foriris. Unue ili kondukis nin al la loĝejo de ĝesinoroj Kubásek, poste ni vizitis la grandegan bierfabrikejon en Plzeň. Ni vidis la grandajn vastajn kelojn, kiuj ampleksas 9 km, kaj en kiuj troviĝas 6500 bareloj, enhavante po 60 hl. La keloj estas hakitaj en roko. Post kuregado dum 3 horoj, ni estis vidintaj la ĉefajn ejojn kaj poste ni vizitis la urbdomon, en kiu troviĝas pentraĵejo kaj kelkaj aliaj rimarkindaĵoj. Fine ni vizitis la presejon, kie oni presas la tagiurnalon kaj ankaŭ esperantan gazeton ĉeĥoslovakian »La Progreso«. Tie ni ren-

alta, sed por ĉiuj la sama, nome: 25 liroj italaj, kiuj egalas je kvin anglaj ŝilingoj. Ĝin oni pagos alveninte por ricevi la kongreskarton.

Propagando. Kiel ni jam ofte antaŭdiris, la spertoj pri komerco estas pli modestaj ol tiuj pri instruado kaj la Venezia konferenco ne povas havi la saman karakteron kiel la Geneva. Ĝi estas nur komenco en fako tre grava kaj preskaŭ esenca. Tiu komenco estas nepre necesa kaj ni devas danki al la komercaj organizaĵoj, kiuj helpis ĝian efektivecon.

La konferenco en Venezia neniel estos registara kiel tiu en Genevo. Ĝi estas antaŭ ĉio kunsido de la foiroj internaciaj, kiuj jam uzis Esperanton kaj renkontiĝo kun kelkaj Komercaj Ĉambroj kaj Turistaj Oficejoj, kiuj deziras aŭdi pri tiuj spertoj kaj kune ekzameni plej bonajn rimedojn por antaŭenpuŝi la uzadon de Esperanto en tiuj fakoj.

Ni rajtas esperi de la konferenco interesajn raportojn kaj saĝajn proponojn, sed eble la plej grava ĝia utilo estas la propaganda. La invitoj paroligis pri la afero en multaj ĝeneralaj kunsidoj de gravaj asocioj en la tuta mondo kaj vekis novajn interesojn.

Per »Hungara Esperantisto« ni aŭdas, ke la Komerca Ĉambro en Budapeŝt alvokis al firmoj (per la ĉiutaga gazetaro) por atentigi ilin pri la konferenco kaj demandi, ĉu ili havas oficistojn scipovantaj Esperanton.

En multaj urboj la invititaj societoj petis paroladon pri la afero. Do entute la konfe-

kontis la urbestron, kiu nin salutis per manpremo kaj esprimis sian bedaŭron, ke li ne komprenas Esperanto, por paroli kun ni sen helpo de perulo. Por plezurigi nin, li venigis la redaktoron kaj petis lin, vidiĝi al ni la tutan presejon. Tiel okazis. Ni vidis la diversajn interesajn maŝinojn kaj ankaŭ la maŝinojn, per kiuj oni kompostas.

Vespere ni vizitis la teatron, en kiu ni ĝuis, ĉar ni vidis diversajn popoldancojn kaj popolikutimojn kaj ankaŭ la belegajn naciajn kostumojn. Post la fino ni rimarkis, ke pluvegas. Ni ne kunprenis surtutojn nek pluvombrelojn kaj ĉar la lasta vagonaro jam estis for, ni estis devigitaj promeni, gliti kaj grimpi tra la pluvego, laŭlonge de nokt-mallumaj montvojoj al Doubravka. Kelkfoje estis tiel mallume, ke ni ne povis vidi la alian, ni nur aŭdis la paŝojn de nia antaŭulo. Sed tamen ni atingis la domon kaj dormis trankvile, ne songante pri niaj malsekaj vestoj.

Vekiĝinte je la sesa, ni rimarkis, ke niaj vestaĵoj jam pendis super la forno, kiu jam estis hejtigita. La vetero aspektis malbele, sed kunpreninte la surtutojn ni denove promenis al Plzeň, por rigardi la urbon kaj stampigi niajn pasportojn. Ni sciigis, ke matene jam estis legeble en la taggazeto, ke ni, Holandanoj, estas en la urbo kaj ĉiuj Esperantistoj estis invititaj kunveni vespere je la sepa en la popoldomo, por interkonatiĝo.

Kaj vere, alvenante ĉe la konstruaĵo, la vizitintoj de la Praha kongreso jam staris antaŭ la domo

renco, eĉ antaŭ sia ekzisto, jam faris multe da bono. Sed nun ni devas ĉion fari por ĝin mem sukcesigi.

ooo

V. KRYSTOF:

ĈEĤOSLOVAKOJ EN LONDONO

La muroj de angla ĉefurbo havas por ni, Ĉeĥoj, multe da memorindaĵoj. En plej memorinda loko de Londono, en Westminster Abbey, en centro de loĝejo de mortintaj anglaj eminentuloj, malproksime de la sanktuario, en kapelo de Eduard Piulo, estas tombejo de angla reĝo Rikardo II, kaj de lia edzino, »bohema princino Anna«, filino de la ĉeĥa reĝo kaj roma imperiestro Karolo IV. Ŝi estis konata kiel helpantino de suferantoj, krimuloj kaj kaptitoj, kaj pri sia honorinda kaj nobla karaktero ŝi akiris en rondoj de angla popolo nomon »bona reĝino Anna«. La monumentojn de »Anna of Bohemia« ni povas ekvidi sur norda portalo de Westminster Abbey kaj sur la Parlamentejo, Anna mortis en la kastelo Sheen, estinte 28-jara; por facila forgeso, Rikardo II, detruigis kastelon, ĉar li ne povis rigardi lokon, kie li kun sia edzino travivis la plej feliĉajn momentojn de sia komuna vivo. En tiu ĉi sama abatejo estas entombigita »reĝino de koroj«, Elisabeth de Stuart — bohema »vintra« reĝino. En teruraj momentoj de 8a novembro 1620*) ŝi estis la sola, kiu

*) Malvenko de ĉeĥaj militistoj sur la »Blanka Monto«. R. r.

por bonveni nin. Amaso da Esperantistoj jam estis en la salono kaj baldaŭ la prezidanto malfermis per kelkaj afablaj vortoj la kunvenon, bonvenis nin, kaj esprimis sian bedaŭron, ke ili tiel malfrue sciigis pri nia alveno. Alie — sed feliĉe, ni eble ankoraŭ estus en Plzeň, ĉar nun la akcepto jam estis tiel kora, ke ni ne kapablas esprimi nian dankon. Per kelkaj vortoj unu el ni respondis je la parolado de la prezidanto. Poste ankoraŭ aliaj amikoj parolis, oni kantis esperantajn kantaĵojn kaj interbabiladis, trinkis bieron. Kaj tiamaniere ni pasigis la vesperon tre agrable, sed antaŭ ol ni disiris, ni devis kanti holandlingve kantaĵojn Holandan. Komprenoble ni faris tion kaj rekompence unu el la ĉeestantaj fraŭlinoj donacis al ni belajn florojn. Por plezurigi nin, la Plzeňanoj kantis kelkajn kantaĵojn ĉeĥajn. Post la deka ni disiris, post la adiaŭa parolado de la prezidanto, kiu ankaŭ estis respondata de unu el ni. Multope ili nin akompanis al la vagonaro kaj baldaŭ ni enlitiĝis denove en Doubravka.

La kvaran tagon ni revojaĝis Holanden, kelkaj amikoj akompanis nin al Plzeň kaj post longa kora adiaŭo kaj »ĝisrevido« s-ro Kubásek nin akompanis ĝis la limo. En Eger ni devis adiaŭi la lastan ĉeĥan amikon, kaj malgraŭ la bedaŭro pri tio, ni ĝoje reveturis hejmen, ĉar denove ni spertis, ke Esperantistoj ĉie havas la plej bonajn amikojn kaj ĉie estas akceptataj kiel fratoj konataj. Vivu Esperanto, per ĝi Frateco, Egaleco kaj Libereco jam estas.

P. J. Hoope.

heroe konservis trankvilon. Poste, post multe da doloroj kaj suferoj, trovis la eksreĝino trankvilon en Haag; ŝia reĝina korto, kiu estis vera azilo de arto, fariĝis kunveno de eminentuloj; tie interrilatis Descartes, Comenius, van Dyck k. a. Fine, post pli ol 40 jaroj de ekzilo, en j. 1660, ŝi revenis en sian patrujon, kie ŝi ankaŭ en j. 1662 en Drury House mortis. Poste el la ruinoj de Drury House elkreskis la teatro »Drury Lane«, kie en la j. 1903 brile eksonis gajaj horoj de eminenta ĉeĥa opero »Prodaná nevěsta« (Vendita fianĉino). En Westminster Abbey, apud sia patrino, estas ankaŭ entombigita ĉeĥa princo Rupreht, kiu naskiĝis en Hradčany (urba kvartalo de Praha kun la palaco de ĉeĥaj reĝoj).

Brila portreto de Rupreht, pentrita en Haag de van Dyck, kaj ankaŭ aliaj portretoj de tiu pentristo estis forrabitaj de Habsburgoj el Praha, transportitaj en Vienon, kie ili ornamis galerion de aŭstria imperiestroj.

Eminente portreto de »ĉeĥa vintra reĝino«, pentrita de Mireveldt, estas en »National Portrait Gallery«.

En Londono vivis ankaŭ »reĝa desegnisto«, la famekonata gravuristo Václav Hollar el Prácheň, naskiĝinta en Praha, sincera »boĥema frato«. Riĉa kolekto de liaj laboroj estas bela ornamo de la ĉeĥa Galerio; ankaŭ s-ro A. Naumann en Praha havas multenombrian kolekton de liaj gravuraĵoj kaj desegnaĵoj. Hollar, krom aliaj, eldonis en Londono »Ornatus muliebris anglicanus«, kaj famekonatajn »Prospektojn« de diversaj urboj. Per fajrego en Londono estis Hollar malriĉigita kaj li mortis en mizero.

Pli malgrandan rolon ludis Londono ankaŭ en vivo de eminenta instruisto de nacioj J. A. Comenius.

Comenius alvenis Londonon en j. 1641, esperante efektiviĝi tie sian pansofian revon. Hartlib promesis al li subtenon de angla parlamento por fondo de »Monda Akademio«. Sed, ĉar samtempe furiozis anglo-irlanda milito, la parlamento ne havis tempon por plenumi projekton de Comenius, kaj li en j. 1642 trompiĝinta forveturis Svedujon. J. A. Comenius eldonis en Londono verkon »Via Lucis«.

Preskaŭ tri jarcentoj poste alia ĉeĥa eminentulo, ankaŭ en Moravio naskiĝinta kaj ankaŭ eminenta vojaĝanto tra la mondo, prof. D-ro T. G. Masaryk, ekiris similan »vojon al la lumo« (»Via Lucis«) — vojon por liberigo de sia patrujo. En j. 1915—1917 ankaŭ paroladis la estonta prezidanto de la respubliko Ĉeĥoslovaka en la londona universitato.

Siajn paroladojn li malfermis per debuta antaŭparolo »The problem of small nations in the European crisis.«*) Prof. Masaryk

*) La problemo de malgrandaj nacioj en la Eŭropa krizo. — Rim. red.

interrilatis en Londono kun Asquith, Lloyd George, Kitchener k. a., traktante kun ili pri liberigo de Centra Eŭropo.

Li skribis en Londono multe da propagandaj artikoloj, ĉefe publikis ilin en revuo: »The New Europe«. Tie estis publikita ankaŭ lia eminenta artikolo: »The future Bohemia«.**)

Krom multe da aliaj historiaj kaj politikaj memorindaĵoj ni, ĉeĥoj, havas multege da aliaj, ĉefe da sportaj rilatoj kaj rememoroj al Londono.

ooo

Prof. MACHAČ:

FREDERIKO SMETANA KAJ FREMDLANDO.

(Elekto dediĉita al ŝatata aŭtoro.)

Kun permeso de sia patro Smetana*) foriris en oktobro 1843 Praha'n, por dediĉi sin al la muziko. Lia deziro estis fine plenumita, sed ekestis batalo pri pano. En tiu tempo li studis teorie ĉe Jozefo Proksch kaj konatiĝis kun Frederiko Kittl, kiu prizorgis al li lokon de muzik instruisto ĉe grafo Leopold Thun. En la jaro 1847 forlasis Smetana sian lokon, por akiri kiel virtuoza iun lokon; sed li malsukcesis kaj suferis denove pro financa krizo. Tiel dirite je l' sojlo de malespero li skribis printempe 1848 kun konfido al Fr. Liszt kaj sendis al li dediĉe sian fortepianan ciklon »Six morceaux caractéristiques«. Fido al Liszt ne estis vana. Liszt ekkonis grandan kapablon de juna ĉeĥa komponisto, akceptis la dediĉon kun la certigo, ke la komponaĵoj estas bonegaj kaj prizorgis ilan eldonon (en Leipzig ĉe Fr. Kistner 1851). Li donis al Smetana monsubtenon por la fondiĝo de propra muzik-instituto kaj invitis lin al si en Weimar. De tio komencis ardanta amikeco inter ambaŭ majstroj kaj neniam pereis.

Kiam Smetana mortis, estis sendita al Liszt komunikilo pri la morto kaj tiu ĉi respondis al sia konatulo K. Navrátil mallonge, sed multsignife: »En rapido mi skribas al Vi, ke min tre tuŝis la morto de Smetana. Li estis genio.« Tiu ĉi komunikilo estas tre ofte citata nome de germana kritiko, kaj mi havos okazon doni ekzemplojn de tio. Amikeco inter Liszt kaj Smetana estis sincera kaj ĝia ekstera formo estis reciprokaj vizitoj. Kiamfoje Liszt venis Praha'n, elserĉis antaŭ ĉio Smetana'n kaj Smetana multfoje estis gasto de Liszt en Weimar. Tie, en lia salono li renkontiĝis kun eminentaj muzikistoj (Büllow, Klindworth, Cornelie, Draeseck k. m. a.), tie ankaŭ li ĵuris

**) La estonta Bohemujo. — Rim. red.

*) Bedřich Smetana estas unu el plej famaj komponistoj ĉeĥaj, aŭtoro de multaj operoj, inter kiuj »Prodaná nevěsta« (La vendita fianĉino) estas la plej fama.

al si en animo, ke li dediĉos sian tutan vivon al la ĉeĥa muziko. Tio okazis tiamaniere: Dum unu sia vizito ĉe Liszt (1889) li renkontiĝis, kiel ordinare, kun artista societo kaj dum la parolado oni rakontis pri Ĉeĥoj. Inter gastoj estis ankaŭ viena komponisto Herbeck, kiu riproĉis al Smetana, ke Ĉeĥoj estas kapablaj nur por arto reprodukta, sed la produkta estas al ili tute fremda. Smetana menciis kelkaj ĉeĥajn muzikistojn kiel ekz. Mysliveček kaj Tomášek. Sed li devis aŭdi, ke la unua komponis en stilo de itala opero kaj la dua »ĉirkaŭmordis malnovan oston de Mozarta stilo«. Ekestanta disputo fariĝis pli kaj pli vigla, ĝis Liszt finis ĝin per vortoj: »Permesu, sinjoroj, ke mi ludu al vi plej novajn pure ĉeĥajn komponaĵojn.« Li sidiĝis al la fortepiano kaj ludis tutan kajeron de komponaĵoj de Smetana; kiam li finludis, li prenis Smetana'n je mano kaj prezentis lin al la societo kiel aŭtoron de la ĵus luditaj komponaĵoj. La disputo ne ripetiĝis kaj kontraŭe la societo amuziĝis plue agrable, kaj kiam en malfrua nokto la gastoj disiris, »ĵuris Smetana al stela ĉielo, ke li dediĉos sian vivon al la ĉeĥa arto«.

Ankaŭ konatecon de Smetana kun Bülow ni ne devas por propagando preterpasi, ĉar »tio ne estis konateco nur supraĵa, al kiu similaj ekzistas inter artistoj; tion bele diris Bülow mem en la jaro 1886 okaze de la festo en »Burĝa gastejo«. »Vi vokis al mi »hura!«. Tiun belan vian vorton mi ne povas uzi pli bone al kiel rememoro pri la viro, kiu unua vekis en mi simpatiojn por Ĉeĥoj, kiam mi konatiĝis kun li en kvindekaj jaroj ĉe Liszt. Tiuj ne mortas, kiuj enkorpigis en grandan penson! Ni voku al la rememoro de Frederiko Smetana „hura!“« (Trad. Riedl.)

oooo

L. RIEDL:

LULKANTO.

(Al A. F.)

Dormu, mia infaneto,
dormu, karulin',
ame kisas vin la panjo,
mole lulas vin.

Dolĉe kantas najtingalo,
dormu infanet',
ĝia milda voĉo sonas
al la fenestret'.

Vidu, dormas hela suno,
dormas tuta ter'
kaj trankvilo, paco venas
el supera sfer'.

Milda estas, hela nokto,
rozo dormas jam

kaj en homa laca koro
kuŝas granda am'.

Gaje ludu kun anĝeloj,
mia infanet'.
bonan nokton al vi diras
via patrinet'.

oooo

STUHLIKOVÁ:

LA DEVO DE LA HOMO AL LA HOMARO.

La homo ne vivas sur la mondo sola, sed ĉirkaŭ li vivas amasoj da similaj individuoj kun egalaj rajtoj kaj devoj. Homo ne devas pensi, ke li havas rajton limigi liberecon de la aliaj kaj altrudi al ili devojn, kiujn li mem devas plenumi. Ĉiu individuo havas sian pozicion, precizan, antaŭe fiksitajn, kiel radeto en la horloĝo, kiel ĉenero. Se unu ne laboras, lia proksimumo suferas, ĉar li devas la unuan anstataŭi. Kaj kiam ni ĉirkaŭrigardas, ho, kiel multaj suferas, kiel granda amaso de homoj bezonas helpon, sopiras je l' vorto de l' frata amo, sopiras je l' helpo. Sed multaj estas egoistoj, ilia propra sukceso estas unua kaj lasta punkto en la vivo, ili marŝas piedbatante korojn de l' fratoj. Ni estas sataj, ni loĝas komforte, sed nek restaĵojn, nek superfluan de nia restaĵo ni donas al suferantaj fratoj. Kaj mi demandas: ĉu tia homo estas ankaŭ kunbatalanto por ideoj de l' homara frateco?

Diru al tiuj nur vorton da konsolo, faru malgrandan bonfaron kaj vi savos multajn de malespero, premu amike manon — kaj neniam ofendu. — Ofendo, malbona vorto kaŭzos doloron en sentema animo kaj ĝin la tempo ne forigos. Kontraŭe, ĝi postulas novan, alian pecon de via koro, ŝirvundas animon kaj kiel veneno mortigas la amon al aliaj.



KULTURO



Memorindaj datoj en marto: La 1. m. 1869 estis fondita unua ĉeĥa banko (Živnostenská banka). — La 2. m. 1458 estis en Bohemujo elektita husana reĝo Jiří z Poděbrad (Georgo el Poděbrady). — La 3. m. 1903 mortis Frant. Lad. Rieger, gvidanto de Ĉeĥoj. — La 5. m. 1827 mortis Alex. Volta, la fama esploristo pri elektro. — La 6. m. 1474 nask. Michelangelo Buonarrotti, itala skulptisto, pentristo kaj arkitektisto. — La 7. m. 1850 nask. Tomáš Garrigue Masaryk, la fondinto de nova ĉeĥosl. sendependeco kaj unua prezidanto de ĉs. respubliko. — La 9. m. 1820 estis en Hispanujo forigita papa inkvizicio. — La 10. m. 1861 mortis Taras Ŝeĉenko, la nacia poeto ukraina. — La 12. m. 1365 estis fondita universitato de Vieno. — La 13. m. 1848 komencis revolucio en Vieno. — La 14. m. 1883 mortis Karl Marx, la fondinto de scienca doktrino socialisma. — La 17. m. 180 mortis en Vieno Markus Aurelius, la roma imperiestro. — La

19. m. 1887 mortis Jos. Ig. Kraszewski, pola verkisto. — La 20. m. 1828 nask. Henryk Ibsen, norvega verkisto. — La 21. m. 1910 komenciĝis la I. kongreso de italaj esp. (en Firenze). — La 22. m. 1832 mortis J. W. Goethe, la plej granda germana poeto. — La 24. m. 1892 estis en Petrograd fondita societo »Espero«. — La 26. m. 1827 mortis Lud. van Beethoven, germ. komponisto. — La 28. m. 1592 nask. J. A. Komenský (Comenius), la ĉefofrata episkopo kaj instruisto de nacioj. — La 30. m. 1909 estis fondita Ruslanda ligo esperantista en Petrograd. — La 30. m. 1920 mort. Hector Hodler, prezid. de UEA. — La 31. m. 1809 nask. N. V. Gogol, rusa verkisto. — La 31. m. 1910 komenciĝis en Parizo I. kongreso de katol. esperantistoj.

La vera Shylock. La intencon eltranĉi pecon da karno el la vivanta homa korpo kaŭze de malgajnitaj veto ni trovas en literaturoj de diversaj nacioj. La plej popularan ekzemplon ni trovis en la »Komercesto de Venecio« de Shakespeare, sed la plej malnovan en la »Haraskandro la virta« el la XII. jarcento. Shylock de Shakespeare, kiu decidis veton kun Antonio estas por ni modelo de vengemo kaj monavideco. Sed interesa estas la fakto, ke en la proceso, kiu versimile estis modelo por Shakespeare, la judo estis suferanto kaj ne atakanto. En la libro »La vivo de Sixtus V.« estas priskribata jena historio: La riĉa komercisto Secchi en Romo ricevis per helpo de Francisko Drake raporton pri venkoakiro de San Domingo kaj li sciigis ĝin al sia konato, hebrea komercisto Simon Conedus, kiu tute energie kontraŭstaris tiun sciigon, nevolante ĝin kredi. Ekscitita li ekkriis: »Mi vetas funton da karno el mia korpo, ke ĝi estas malvera!« Secchi metis sur la tablon 1000 skudojn kaj lasis skribi protokolon pri la stranga veto, kiun subskribis du atestantoj, unu kristano kaj unu hebreo. Baldaŭ montriĝis la vereco de la raporto. Secchi sencedeme persistis plenumon de sia rajto, volante per la eltranĉo de la karno enkonduki sian konkuranton en danĝeran situacion. La hebreo turnis sin al la urba gubernero petante, ke li devigu Secchi-on ŝanĝi la kondiĉon de la veto kaj akcepti 1000 skudojn. La gubernero, ne povante sukcesi, raportis pri la afero al la papo Sixtus V. Tiu ĉi parolis al Secchi severe: »La rajto estas sur via flanko, do uzu ĝin. Sed atentu bone: se vi eltranĉos nur je unu gramo pli multe aŭ pli malmulte, vi pendos sur eŝafodo!« La samajn vortojn elparolas ankaŭ la juĝisto en la dramo de Shakespeare. Post tiu ĉi decido de la papo la ambaŭ rivaloj volis paciĝi, sed la papo montris sian severecon: li deklaris unu por mortigisto, la alian por memmortiginto kaj kondamnis ilin al morto. Sed li volis ilin nur timigi, ĉar li ŝanĝis tuj la decidon ŝanĝante la punon en ĝismortan mal-liberigon kaj fine, kiam ili estis forkondukotaj en malliberejon, li pardonis ilin, post kiam ili estis pagintaj po 2000 skudoj por la profito de la hospitaio di Ponte Sisto. Tiu ĉi historio el la vivo de la granda papo servis al Shakespeare kiel modelo por la »Komercesto de Venecio«.

Ĉu oni povas morti pro ĝojo? La historio rakontas, ke pro subita ekĝojego mortis ĉi tiuj historiaj personoj: La papo Leo X. el familio de Mediceoj, kiam li sciigis pri la venko de imperiestraj armeoj kontraŭ francoj. — La glora matematikisto Lughtred, kiam li sciigis, ke la angla parlamento postulis la reĝon Karolo II. reveni en la patruon. — La heredantino de Leibnitz, post

kiam ŝi trovis en lia lito multe da dukatoj kaj la pola reĝo Aleksandro, kiam li en j. 1505 ekaŭdis pri la venko de sia armeestro Glincki. — La rido kaŭzis morton de jenaj antikaj personoj: de Filomeno el Sirakuzoj, de Polikrato el la insulo Nakso, de Diagono el Rhodo kaj de Philistro el Nicaeo. En 1810 aperis en Parizo verko de kuracisto Roy, kiu priskribas similajn mortojn. (Traité medico-philosophique sur le rire.)

oooo

LEGOLIBRO.

Janko-muzikanto.

Novleto de H. Sienkiewicz.
(Fino.)

Sed la violono en la lumeco de tempo al tempo ŝajnis proksimiĝadi, kvazaŭ naĝi al la infano... Je momentoj ĝi estingiĝadis, por ree ekradii ankoraŭ pli forte! Artoj magiaj, videble artoj magiaj! Dume la vento ekblovis, la arboj mallaŭte ekbruis, la bardanoj ekmurmuris kaj Janko ŝajne ekaŭdis kompreneble:

»Iru Janko! en la antaŭĉambro estas neniu... iru Janko!«...

La nokto estis klara kaj lumā. En la palaca ĝardeno apud la lageto la najtingalo komencis kanti kaj fajfi jen mallaŭte jen pli laŭte: »Iru, iru, prenu!« La honesta nokta korvo per mallaŭta flugo turniĝis super la kapo de la infano kaj ekvokis: »Janko, ne! ne!« Sed la nokta korvo forflugis kaj la najtingalo restis kaj la bardano ĉiam pli kompreneble murmuradis: »Tie neniu estas!« La violono ree ekradiis...

La mizera, malgranda, kunpremita formo malrapide kaj singarde sin movis antaŭen, kaj dume la najtingalo mallaŭtete fajfadis: »Iru, iru, prenu!«

La blanka ĉemizeto biletis ĉiam pli proksime de la pordo antaŭĉambra. Jam ne kovras ĝin la nigraj bardanoj. Sur la porda ŝtupo de la antaŭĉambro oni aŭdas la rapidan spiradon de la malsana brusto de la infano. Ankoraŭ minuto, la blanka ĉemizeto perdiĝis, jam nur unu nuda piedeto restas post la porda ŝtupo. Vane, nokta korvo, vi transflugas ankoraŭ unu fojon kaj vokas: »Ne! Ne!« Janko estas jam en la antaŭĉambro.

Tuj laŭte ekkvakis la ranoj en la lageto de la ĝardeno, kiel terurigaj, sed poste ili silentiĝis. La najtingalo ĉesis fajfi, la bardanoj murmuri. Dume Janko rampadis mallaŭte kaj singarde, sed tuj lin ĉirkaŭprenis la timo. En la bardanoj li estis kiel sovaĝa besteto en la arbetoj, kaj nun li estis kiel sovaĝa besteto en la kaptilo. Liaj movoj fariĝis rapidaj, la spirado mallonga kaj fajfanta, kaj ekster tio ĉirkaŭprenis lin la mallumo. Mallaŭta somera fulmo, transkurinte inter la oriento kaj okcidento, superlumis ankoraŭ unu fojon la internajon de la antaŭĉambro kaj Jankon sur la kvaroj antaŭ la violono kun kapo supren levita. Sed la fulmo estingiĝis, la lunon kovris nubeto, kaj jam nenion oni povis nek vidi nek aŭdi.

Post momento el la mallumo elvenis sono mallaŭteta kaj plora, kiel se iu negardeme ektuŝetus la kordojn kaj subite...

Iu basa dormema voĉo, elvenanta el la angulo de la antaŭĉambro, ekdemandis kolere:

— Kiu tie?

Janko retenis la spiron en la brusto, sed la dika voĉo demandis la duan fojon:

— Kiu tie?

Alumeto jetis sian brilon sur la muron; fariĝis lume kaj poste... Eh! Dio! Oni aŭdas malbenojn, batojn la ploron de infano, vokadon: »Ho! pro Dio!«, la bojadon de hundoj, kuradon de lumoj sur la vitroj de fenestro, bruon en la tuta palaco.

La duan tagon la malfeliĉa Janko staris jam antaŭ juĝo ĉe la vilaĝa juĝisto.

Ĉu ili devis lin juĝi kiel ŝteliston?... Certe. Ekrigardis lin la juĝisto kaj la ĉesidantoj, kiel li staris antaŭ ili kun la fingro en la buŝo, kun larĝe malfermitaj terurigaj okuloj, malgranda, malgrasa, batita, ne sciante, kie li estas kaj kion oni volas de li?... Kiel juĝi tian mizeron, kiu havas dek jarojn kaj apenaŭ staras sur la piedoj? Sendi ĝin en la malliberejon, aŭ kiel? Oni ja devas havi iom da kompatio por infanoj. Ke lin prenu la gardisto, ke li donu al li batojn per la vergo, por ke li duan fojon ne ŝtelu, kaj finita la afero.

— Nature!

Oni vokis Staĥon, kiu estis la gardisto:

— Prenu lin kaj donu al li memorajon!

Staĥo ekbalancis sian malprudentan, bestan kapon, prenis Jankon sub la brakon kiel katidon kaj enportis en la grenejon. Ĉu la infano ne komprenis la aferon, aŭ estis timigita, sufiĉe ke ĝi ne eldiris eĉ unu vorton kaj nur rigardis, kiel rigardus birdo. Ĉu li scias, kion oni faros kun li? Sed kiam Staĥo en la grenejo distiris lin sur la tero kaj levinte la ĉemizeton forte ekbatis, tiam Janko ekkriis:

»Patrineto!« kaj ĉe ĉiu ekbato de la vergo li vokis: »Patrineto! patrineto!«, sed ĉiam pli mallaŭte, pli malforte, ĝis kiam ĉe foma ekbato la infano ŝilentigis kaj ne vokis plu la patrineton....

Malfeliĉa rompita violono!...

— He, malprudenta malbona Staĥo! kiu batas tiel la infanojn? Ĝi ja estas malgranda kaj malforta, kaj ĉiam ĝi estis apenaŭ viva.

Alvenis la patrino, forprenis la knabon, sed devis ĝin porti en la domon... La duan tagon Janko ne leviĝis, kaj la trian vespere li jam mortadis trankvile sur la mizera lito sub saktola kovrilo.

La hirundoj pepadis sur la ĉerizarbo, kiu kreskis apud la pordo, radio de l' suno eniradis tra l' vitro de fenestro kaj superversadis per ora lumo la kapeton de la infano kaj la vizaĝon, en kiu ne restis guto da sango. Tiu radio estis kiel vojo, sur kiu la malgranda animo de la knabeto devis foriri. Bone, ke almenaŭ en la momento de la morto ĝi foriradis sur la larĝa suna vojo, ĉar en la vivo ĝi iradis ja sur pikaĵoj. Dume la malgrasa brusto movadis sin ankoraŭ per spiro, kaj la vizaĝo de la infano estis kiel aŭskultanta la eĥojn de la vilaĝo, kiuj eniradis tra la malfermita fenestro. Estis vespero, tial la knabinoj revenante de la fojno kantis: »Hoĵ, sur la verda herbejo!« kaj el la flanko de la rivereto alvenadis la ludado de fajfiloj.. Janko aŭskultis la lastan fojon, kiel ludas la vilaĝo... Sur la litkovrilo kuŝis apud li la violono el tegmenta tabuleto.

Subite la vizaĝo de la mortanta infano eklumiĝis, kaj el la blankiĝantaj lipoj elvenis mallaŭta voĉeto:

— Patrineto?...

— Kion, mia filo? — respondis la patrineto, kiun premadis la larmoj!...

Patrineto! Dio donos al mi en la ĉielo veran violonon?

— Donos al vi, fieto, donos! rediris la patrino; sed ŝi ne povis paroli pli longe, ĉar subite el ŝia malmola brusto elrompis sin la kolektita malĝojo,

tial nur ĝeminte: »Ho Jezu! Jezu!« ŝi falis per la vizaĝo sur la keston kaj komencis ploregi, kiel se ŝi estus perdinta la prudenton aŭ kiel homo, kiu vidas, ke i jam ne elŝiros a la morto sian amataĝon...

Kaj ŝi ne elŝiris ĝin, ĉar kiam levinte sin, ree ŝi ekrigardis la infanon, la okuloj de la malgranda muzikanto estis ankoraŭ malfermiaj, sed senmovaj kaj la vizaĝo tre grava, malhuma kaj rigida! La suna radio ankaŭ forigis...

Pacon al vi Janko!

La trian tagon la gesinjoroj revenis en la palacon el Italujo kune kun la fraŭlino kaj la fraŭlo, kiu penadis pri ŝia mano. La fraŭlo diris: »Quel beau pays que l'Italie!« —

Kaj kia popolo de artisoj! On est heureux de chercher la-bas des talents et de les protéger... aldonis la fraŭlino.

Super Janko bruas la betuloj.

Trad. A. Grabowski.

(Legajoj kolektitaj de Alois Štěpán.)

Sorĉisto. Glora eskamotero Hermann estis unufoje invitita al la gubernero en Montevideo. Inter la gastoj troviĝis tri strangaj Patagonoj. Hermann decidis fari serĉon. Li alpaŝis al la unua kaj eltiris el lia nazo oranĝon. Patagono estis tiel ektimigita, ke li ekbruegis. Al la dua Hermann eltiris el la baroj piastrojn kaj al la tri el la nazo vivan muson. Patagonoj ektimigitaj forkuris. Ĉiuj ĉeestantoj gratulis al la sorĉisto, kiam li subite ekkriis: »Mia horloĝo kun ĉeneto estas al mi ŝtelitaj kaj ankaŭ mia monujo, nazumo kaj naztuketo.« Ĉiuj konsilis kion fari, kiam dume interpretisto de Patagonoj alportis ĉiujn objektojn al Hermann, al kiu la tria Patagono lerte ŝtelis ilin.

Valoro de homoj kaj de azenoj. Nastradin Hoĝa estis translokiĝanta kun sia azeno sur ŝipo el Konstantinoplo en Skutaron. Kiam ili estis sur la dua bordo, demandis Hoĝa la pramiston kian transportaĝon li ŝuldas. La pramisto diris: »Groŝon por vi kaj groŝon por la azeno.« »Jen vi havas du groŝojn,« ekkolerigis Hoĝa, »kaj reveturigu nin. En la lando, kie oni taksas la homojn same kiel azenojn, mi ne volas loĝi.«

Danĝera loko. Franca generalo Cherin gvidis iam sian militistaron sur danĝera vojo kaj kuraĝigis soldatojn al persisto. Unu el ili estis tiel aroganta, ke li elvokis: »Al vi estas bone, sinjoro generalo! Vi bone sidas sur la ĉevalo, sed ni, malriĉuloj, devas iri piede.« Post tiuj vortoj desaltis la generalo de la ĉevalo kaj proponis al la soldato sian lokon. Tiu ŝanceliĝis, sed li devis obei. Apenaŭ li eksidiĝis sur la ĉevalon, estis mortigita per malamika kuglo. »Vidu,« diris Cherin al ceteraj soldatoj, »la plej alta loko estas la plej danĝera!« Generalo ree sidiĝis sur la ĉevalon kaj daŭrigis la vojon.

Recepto. Iam venis unu sinjorino de tre viva mieno al la glora bohema kuracisto d-ro Hamernik kaj demandis lin, kian rimedon ŝi povus uzi kontraŭ sia malsano. »Kio mankas al vi?« demandis la profesoro. — »Mia lango tremas.« — »Nu, ĉu vi estas edziniĝinta?« — »Jes.« — »Nu, forveturu por tri monatoj en kamparon, via lango bezonas ripozon!«

Memoro de pentristo. La glora franca pentristo Horace Vernet renkontis iam markizon de Pastoret kun iu bela juna sinjorino, kiu interesis lin pro sia ĉarmeco kaj nobla konduto. Li estus volonte

demandintá la markizon, kiu estas la nobla sinjorino, sed la markizo forveturis kaj la pentristo renkontis lin nur post kelkaj jaroj. »Kiu estis tiu ĉarma sinjorino, kun kiu mi vin vidis antaŭ 5 jaroj printempe en Parizo?« demandis Vernet. Sed markizo ne povis memori. Jen Horace Vernet ekprenis krajonon kaj per kelkaj trajtoj li skizis la bildon de la sinjorino. »Ho!« ekkriis en granda surprizo la markizo. »Ĝi estas grafino Nouvegne. La bildo estas efektive surprizanta.«

Kiso en Vatikano. Iam okazis en privataj ĉambroj de papo en Vatikano bela sceno. Grafino Peccio, nevino de Leo XIII., loĝis kun sia fianĉo ĉe sia onkio; dum la vizito la papo foriris por momento. Kiam ne atendite li revenis, li surprizis la gefianĉojn ĉe kisado. Pente kisis grafino Peccio al la sankta patro la manon kaj senkulpigis sin, ke en la sanktaj ĉambroj ili tiom sin forgesis. La papo bele karesis fianĉinon sur la vango. »Ekzistas neniu ĉambro«, li diris, »kiu estas tiel sankta, ke juna pura amo povas ĝin malestimigi kaj makuli.«

Manko de pano. Iam eksciis grandprinco Sergej, eksgubernero de Moskvo, ke malriĉuloj povas aĉeti tre malfacile malgrandan parton da pano. Por konvinkiĝi pri tio li vestis sin kiel vilaĝano kaj iris al bakisto. »Kiom kostas funto da pano?« li demandis. — »Kvar kopekojn,« respondis bakisto. — »Donu al mi panon je du kopekojn, mi ne havas pli,« postulis la supozata vilaĝano. Sed bakisto rifuzis; pli malmulte ol funton da pano li ne vendos. La grandprinco petis pli insiste: »Mi havas grandan malsaton kaj hejme multenombrian familion,« li diris. Sed bakisto ekkoleriĝis, ordonis al li foriri el vendejo kaj kiam la grandprinco ne obeis, li aĉvokis policiston. Policisto alkondukis obstinan vilaĝano nkun multaj insultoj al juĝisto kaj donis al li dum vojo kelkajn batojn. Ankaŭ la juĝisto akceptis lin brutale kaj demandis lin kolere pri lia nomo. Kia estis surprizo de ĉiuj, kiam el la vilaĝano estis mem la grandprinco! Vespere sidis bakisto, policisto kaj juĝisto konkorde en malliberejo.

Klap, klap, klap. Eble antaŭ 40 jaroj instruadis en iu sudbohemia urbeto maljuna instruisto. Liaj infanoj ne povis lerni legadon kun konvenaj paŭzoj post la komo kaj punkto. La instruisto elpensis sekvantan metodon, pro kiu li estis tre fiera: Kiam infanoj laŭte legis kaj alvenis al la komo, ili devis diri »klap«, apud la punktokomo »klap, klap« kaj apud la punkto »klap, klap, klap«. Unufoje ricevis la instruisto sciigon, ke sinjoro vikario vizitos lernejon, por konvikiĝi, kiel la lernantoj progresas. La instruisto lasis lernantoj en lernejo kaj ĉion kun ili ripetis detale. Al la fino diris: »Kiam vi legos antaŭ paroĥa moŝto, vi ne devas laŭte elparoli »klap«, vi nur tiun ĉi vorton en animo ripetu, por precize legi!« La tago de la ekzameno proksimiĝis kaj sinjoro vikario venis. Li vokis unue malgrandan knabon, kiu en antaŭa tago ne ĉeestis kaj kiun sinjoro instruisto forgesis atentigi pri sia hieraŭa admono. Sinjoro vikario ordonis al la lernanto legi ĉapitron el »Malnova testamento«. La knabo vigle stariĝis kaj legis: »Kaj diris Eternulo al Mozeo dirante: »klap«, alparolu izraelajn infanojn sekve: »klap, klap« kaj tion vi diros al ili »klap, klap, klap«. — Malfeliĉa instruisto tre ĉagreniĝis, sed sinjoro vikario ridis tiel gaje, kiel neniam antaŭe.

Partio de ŝakludo. Dum granda revolucio franca estis la mondkonata kafejo »Régence« en Parizo rendezvuo de gloraj viroj: Mirabeau, Barère, Danton, St. Just kaj Robespierre estis tie ĉiamaj gastoj.

Sangsoifanta arrasa legato trovis tie ĉi dum la tempo de terorismo nur kelkajn ŝakistojn, kiuj estis sufiĉe flegmaj, kun li lukti sur ŝaktabulo. Unu vesperon, kiam Robespierre sola enuis en kafejo, eksidiĝis ĉe ŝaktabulo kontraŭ li bela juna viro, de malgranda, gracia staturato kaj eĉ ne unu vorton ekparolante, li forŝovis unu figuron sur la ŝaktabulo. Ankaŭ Robespierre ŝovis kaj ludo en momento progresis. La junulo gajnis unuan ludon, la duan Robespierre, trian ree la junulo. — »Sufiĉe,« diris diktatoro, mordante en kolero sian lipon, ĉar lia egoismo estis ofendita, »sed je kia veto ni ludis?« — »Je kapo de iu homo,« respondis junulo per tremanta voĉo, »mi ludgajnis ĝin, donu ĝin al mi rapide, ĉar matene ĝin forprenus ekzekutisto de la korpo.« Kaj samtempe prezentis al sia kontraŭulo liberigan dekretion kun la nomo de grafo Ravigne, kiu estis arestita kaj kondamnita al la morto. Robespierre, mirigita per tiu kuraĝeco, subskribis la dokumenton kaj demandis: »Kiel vi nomas, sentima civitano?« — »Diru pli bone civitanino!« respondis kun tremanta voĉo la knabino. »Mi estas fianĉino de grafo Ravigne. Mian dankon kaj saluton!«

Mirinda memoro. Franca verkisto Villemain aŭdis iam legi unuan akton de dramo de alia juna verkisto. »Tre bela, kaj vere interesa!« diris Villemain al la verkisto. »Sed tiu ĉi verko ne estas via!« — »Kial ĝi ne estas mia verko?« demandis verkisto kolere. — »Mi konvinkos vin,« respondis Villemain kaj ripetis dum 10 minutoj la versojn, kiujn li jus aŭdis. Granda kolero ekregis en aŭdantaro. La verkisto ekrigidiĝis kaj balbutis ion pri magio. — »Trankviliĝu!« ekridetis nun Villemain, »tion kaŭzis mia bona memoro. Mi faris gajan sorĉon.«

La patro sidas kun dorso turnita al la fenestro kaj kantas lulante filineton sur la genuoj: »O, suneto, suneto, kiel vi varmigas mian koron!« — »Ĉu vi havas koron sur la dorso?« demandas la filineto.

Fraŭlino plendis ĉe la fotografisto, ke li faris ŝin tro maljuna. »Nenio mankas, fraŭlino, vi povas uzi la fotografajon ankaŭ post jaroj!«

Demando: »Kia diferenco estas inter la virino kaj fonografo?« — Respondo: »Fonografo parolas, kiam mi volas, sed virino, kiam ŝi volas!«

Multaj filozofoj malŝatas monon, se ili ĝin ne havas.

Kiu estas al sinjorinoj plej malmulte ĝentila? — Gramatiko, ĉar ĝi preferas ĉie la viran sekson.

Patrino: »Infanoj, hodiaŭ vi devas esti bonaj, la patro havas malsanan manon, li ne povus vin bati!«

Ĉe iu teatra societo prenis la rolon de Faŭst la direktoro mem. Tie diris iu aktoro al sia kamarado: »Hodiaŭ ni ree estas trompitaj; la direktoron prenos hodiaŭ la diablo kaj ni morgaŭ akceptos neniun salajron.«

Profesoro de zoologio finis la parton pri bruto kaj poste li diris al la lernantoj: »Bone preparu vin, venonte mi ekzamenos bruton.«

Kia diferenco estas inter la ŝtelisto kaj la kuracisto? — La ŝtelisto scias, kio mankas dum lia foriro, doktoro ofte ne scias, kio mankas, kiam li foriras.

Sinjoro Babka foriras post noktomezo hejmen. La kelnerino vokas post li: »Sinjoro Babka, ĉu vi timas hejmen?« — »Ho ne, hejmen ne, sed hejme.«

»Estas vere, ke vi, Franciskino, volas resti fraŭla?« — »Jes, mi volas studi en Svisujo je la doktorino.« — »Restu hejme kaj studu je tio, ke vi akceptu doktoron kaj vi estos ankaŭ doktorino.«

Juĝisto: »Vi volas ekszedziĝi, kiam vi vivis kune 40 jarojn?« — Edzo: »Nu, ne estas tio sufiĉe?«

Sinjoro: »Al la strataj almozuloj mi p ricepe nenion donas.« — Almozulo: »Mi petas vin, bonvolu al mi doni adreson, mi venos en domon.«

Knabinoj restas al la unua amanto tiel longe fidelaj, ĝis ili kaptos alian.

Botista lernanto staras antaŭ sonorilo de bele konstruita domo kaj ploras. Preter li paŝas sinjoro kaj vidante plorantan knabon, demandas komplate, kio al li okazis. »Mi ne povas atingi sonorilon,« diris knabo. Sinjoro kompleze eksonoras forte. »Sed nun ni rapide forkuru, tie ĉi oni havas malbonan domserviston!« diras la knabo kaj forkuras.

Li: »Hodiaŭ estas festo de Adamo kaj Eva. Kial oni nomas hodiaŭan tagon donacema Kristnaska vespero?« — Ŝi: »Certe tial, ke Dio donis al Adamo Evon.«

Distrikta lerneja inspektoro ne konante vojon, demandis en kampoj knabon, kiun li renkontis: »Knabo, kien kondukas tiu ĉi vojo?« — La knabo kun rido respondis: »Nu, ni vidu, en la lernejo matene vi diris, ke mi nenion scias, kaj nun vi ankaŭ nenion scias.«

Gardisto kaptis ciganon ĉe enŝteliĝo en bienon: »Kion vi tie ĉi faras, knabego?« — Cigano: »Mi malfermas mallaŭte, por ke mi neniun veku kaj vi tie ĉi tiel krias!«

Paroĥestro: »Kial vi ne laboras? Ĉu vi ne konas la belan sentencon, ke laboro vivon dolĉigas?« — Vagisto: »Jen, kial mi laboron abomenas. Mi devas eviti ĉion dolĉan, ĉar mi havas ĉiujn dentojn kavaj.«

En societo oni rakontis pri junaj geedzoj. »Li ŝin tiel amas, ke li ŝin sur manoj portas,« diris unu el sinjorinoj. — »Mi kredas,« aŭdigis sin la dua. »Li tion faras ne pro amo, sed, ke ŝi ne disŝiru multojn da botoj!«

»Mi petas vin, pro kia kaŭzo mortis subite via najbaro?« — »Pro la helpo de du kuracistoj,« respondis demandito.

Sinjinorino N.: Ĉu vi prenos nunjare studentojn en loĝejon?« — Sinjinorino K.: »Nu certe, kiu gardus miajn filinojn, kiam mi ne estas hejme?«

»Pruntu al mi 5 Kĉ,« diris izraelido al sia amiko. — »Mi ilin ne havas,« diris tiu ĉi, »mi havas nur 3 Kĉ.« — »Donu ilin al mi, kaj vi ŝuldos al mi 2 Kĉ.«

Bonaj ideoj estas kiel butonoj ĉe la ĉemizo — ili mankas al ni ofte.

Li malsukcesis.

(Por la III. konkurso.)

Kleriga societo de unu malpli granda urbeto decidis en unu sia kunveno aranĝi esperantan kurson por komencantoj. Post la kunveno restis en halo ankoraŭ kelke da societanoj kaj interparoladis pri la mondlingvo Eesperanto, kiel ĝi taŭgas por internaciaj rilatoj kaj estas uzata de ĉiuj nacioj. En plej vigla interparolado pri Esperanto eniris en la saman halon al ĉiu bone konata loka Idisto, kiu eksciante, ke oni decidis instrui Esperanton, li tre riproĉis, kial oni ne akceptis Idon, kiu estas pli taŭga, pli scienca kaj pli perfekte kreita lingvo internacia ol la lingvo Esperanto. Plue li pruvadis, ke Idon neniam povas Esperanto anstataŭi kaj pri tiu ĉi li faris eĉ mokajn rimarkojn. Unu societano longe aŭskultadis lian balbutadon kaj kiam li ne ĉesis mallaŭdi Esperanton kaj nur ĉiam per sia perfekta Idon li ĉanĝaronis, li interrompis lin:

»Sed diru al ni, amiko, kiel ĝi povas esti perfekta, se ĝi estas ankoraŭ nur Idon? Venu, kiam ĝi estos matura kaj tiam ni eble ekkredos vin!«

Post ĉi tiuj vortoj ekregis en la halo brua rido kaj »nia idisto« nesciante kion respondi, li baldaŭ malaperis.

M—ta.

oooo

DE LA INTERNACIA LABORA OFICEJO.

La 17a kunsido de la Administra Konsilantaro.
La Administra Konsilantaro de la Internacia Laboroficejo havis sian 17an kunsidon la 30an de januaro kaj tri sekvintajn tagojn. La konsilantaro konsistas el reprezentantoj de registaroj, mastroj kaj laboristoj, kaj la kunsido, kiun prezidis s-ro Arthur Fontaine, delegito de la franca registaro, kunigis konsilantojn el la jenaj landoj: Aŭstrujo, Belgujo, Ĉilio, Danujo, Finnlando, Germanujo, Granda Britujo, Hindujo, Hispanujo, Italujo, Japanujo, Polujo, Sudafriko, Svedujo kaj Svisujo. En la daŭro de tiu kunsido la konsilantaro ekkonis la raporton de la direktoro pri la ĝenerala agado de la oficejo dum la lastaj tri monatoj, kaj konsideris iujn demandojn pri la financoj de la Ligo de nacioj, kiom tiuj koncernas la budĝeton de la oficejo. La kunsido estis tamen dediĉita precipe al la demandoj enskribotaj en la tagordon de la plej proksima internacia labora konferenco, kiu kunvenis en Genève la venontan oktobron. Jen la plej gravaj demandoj, kiujn oni decidis proponi al la konferenco: La utiligo de la libertempo de la laboristoj; la egala traktado de la laboristoj naciaj kaj fremdlandaj rilate al kompenso okaze de akcidentoj; la difino de ĝeneralaj principoj pri laborinspektado; kaj, fine, al demando pri semajna 24-hora ripozo en vitrofarejoj produktantaj persenĉesaj procedoj. La problemon pri nokta laboro en bakejoj oni ekzamenos denove dum la plej

proksima kunsido, kiu malfermos la 10an da aprilo. La konsilantaro ekkonis kontente la rezultatojn de la vojaĝo en Amerikon de la direktoro s-ro Albert Thomas. Estas espereble, ke la teknika kunlaboro, jam konsentita de Usono en diversaj okazoj, de nun plimultiĝos. La amerika federacio de laboro kaj la komerca ĉambro de Usono, dum la vizito de la direktoro, publike montris sian intereson pri la agado de la Internacia Labora Oficejo, kaj ambaŭ organizaĵoj serĉas rimedojn kunhelpi ĝin.

Internacia kongreso kaj ekspozicio pri socia ekonomio en Buenos Aires. En la numeroj de la 19a kaj 26a de januaro de »Industriaj kaj laboraj informoj« (la ĉiusemajna angla kaj franclingva eldonaĵo de la Internacia labora oficejo de la Ligo de nacioj) D-ro Tomas Amadeo, sekretario ĝenerala de la Socia muzeo de Argentino, klarigas la celon kaj prezentas la provizoran programon de Internacia kongreso kaj ekspozicio pri socia ekonomio, kiujn la Socia muzeo intencas organizi. Tiuj kongreso kaj ekspozicio okazos, laŭ intenco, en Buenos Aires en septembro 1924. La kongreso kunvenigos la sociajn muzeojn kaj similajn instituciojn de diversaj landoj kaj klopodos por kunlaboro inter ili; sed oni esperas efektiviĝi multe pli ampleksan programon. La demandoj diskutotaj estas grandparte demandoj pri leĝfaro, kaj la registaroj estos invitataj sendi reprezentantojn. Oni proponas ekzameni la tutan kampon de socia politiko en la celo pli efike kunordigi ĉiujn klopodojn naciajn kaj internaciajn por la plibonigo de industriaj kaj sociaj kondiĉoj, kaj la ekspozicio celos ilustri la agadon faratan ĉiulande por tiaj aferoj. Estas entrepreno, kiu kompreneble tre interesas la Internacian laboroficejon, kaj kiu devus efektive favori la celojn, por kiuj la internacia labora organizaĵo estas starigita de la pakontraktoj. La Organiza komitato jam ricevis tro kuraĝigantajn promesojn pri kunlaboro. La elekto de la urbo Buenos Aires, kiel sidloko de la kongreso, ebligas samtempe pli bonan konon ĉe la eŭropaj popoloj pri la socia progreso de la sudamerikaj ŝtatoj kaj pli intiman kunlaboradon inter Ameriko kaj la ceteraj kontinentoj por la utilo de la tuta mondo.

DIVERSAĴOJ

En la nuna ĵarkolekto ni enpresos portretojn de la ĉefaj propagandistoj de esp. en Ĉeĥoslovakujo. Niaj legantoj certe ĝoje akceptos ĉi tiun novaĵon.

La foiro de Praha, nominte s-on A. Pitlík pro liaj peresperantaj porfoiraj laboroj membro de la foira honora komitato, komisiis lin, ke li reprezentu ĝin ĉe la esp. komerca konferenco en Venecio.

Prelato d-ro Gieswein, deputito el Budapeŝto, fondinto de la respublikana partio hungara kaj malnova pioniro de Esp. paroladis la 24. feb. en Praha por la societo »Warheit« pri pacifismo. Post la parolado li kunvenis kun la lokaj esperantistoj en kafejo »Edison«.

The National Geographic Magazin, bilda revuo en Washington kaj organo de »National Geographic Society« rekomendas en sia feb. numero Esp. kiel helpilovon de la centroeŭropaj ŝtatoj.

Landa lerneja konsilantaro por Bohemujo dissendis al duagradaĵojn demandilon statistikan (presaĵo A. B.), kie sub litero e (laboroj animaj) troviĝas demando: Kiujn lingvojn la lernanto lernas private? Je la sepa loko de tiu ĉi parto estas

ankaŭ rubriko por Esp., kiun ankoraŭ sekvas la rubriko: Aliaj lingvoj.

Zamenhofa monumento sur la tombo en Warszawa. En la febr. numero de Esperanto publikitaj du unualoke premiitaj monumentprojektoj ne povas el artista vidpunkto kontentigi la plej modestajn dezirojn de la tutmonda esperantistaro, ĉar ili esprimas — krom la surskribo kaj stelo (la kvin figuroj estas jam longe konata poŝtkarta motivo!) — nenium ideon, kiu regis la vivon kaj agadon de d-ro Zamenhof. La organiza kaj loka monumenta komitato faris eraron aranĝinte por la internacie kolektita mono nur interpolan konkurson. Granda povesperanta propagando estus estinta la internacia pormonumento konkurso, kiu estus alportinta ne sole projektojn unuarangajn, sed ankaŭ atenton priesperantan de la ĉefaj skulptistoj tutmondaj, kiuj estante premiitaj, certe estus prilaborintaj sian definitivajn verkon en Warszawa mem!

Kotizajo de la XV. en Nürnberg. Al la plendantoj pro la alta kongresa kotizo (50 Kĉ sen ĉiu ajn familia rabato) sciigas la ĉefa membro de la Konstanta Komitato Kongresa, ke li tute na havis okazon esprimi sian tiurilatan opinion, ĉar li ne ricevis kotizajrilatan proponon de la L. K. K. de la XV. pere de la sekretariejo de la K. K. K. en Parizo por pridiskuto kaj propono, kiel postulas la reguloj kaj statutoj de K. K. K.

Esperanto-Instituto en Praha. Kiel ni private eksciis, s-o Pitlík preparas fondon de scienca Esperanto-Instituto en Praha, kiu havante sekciojn: lingvan, historian, statistikan, ekzamenan, eldonan, eksterlandan kaj ĝenerale informan, fariĝos neutrala scienca centro por Ĉeĥoslovakujo, estante ĉiurilate sendependa nacia aŭ klasa ĉeĥoslovaka esperantista organizaĵo. Komence ĝi estos entrepreno privata.

Albumo de Plzeň. Siatempo ni sciigis, ke la Esperantista Klubo de Plzeň, helpata de diversaj lokaj urbaj oficoj, pretigis grandan albumon enhavantan fotografajojn de diversaj konstruaĵoj, stratoj kaj fabrikoj de Plzeň, geografiajn karton de la Ĉs. respubliko, fotogr. de prezid. Masaryk, de la eksterlanda ministro Beneš k. a. La albumo estis vizitonta — laŭ aprobo de la urba konsilantaro — diversajn eksterlandajn ekspoziciojn kaj ĝia unua celo estis Rio de Janeiro, kie ĵus okazas Jubilea ekspozicio por festi cent jarojn da brazila sendependeco. Sed jam la unua vojaĝo de la albumo estis malfeliĉa: La transporta kompanio, kiu zorgis pri la transporto, ĵus anoncis al la klubo, ke la ŝipo »Skogland«, kiu transportis la albumon, kaŭze de nebulo frakasiĝis apud la insulo Vigo kaj dromiĝis kun la tuta ŝarĝo. — La albumo estis asekurita je 3000 Kĉ.

Kroniko. La ĝenerala kunveno de Ĉ. E. A. okazos dimanĉe je la 9. horo en kafejo »Opera«, Praha III., apud la ponto de Legioj. Partoprenu multnombre! — Esp. Klubo de Plzeň aranĝis sian XVIII. ĵarkunvenon la 24. feb. Elektita estis jena komitato: Komercesto J. Pavlík, prezidanto; tekn. ofic. B. Tittl, sekret.; ing. R. Novák, vicprezid.; imposta ĉefadm. J. Storch, kas.; instr. A. Kasal, protok.; banka of. A. Loukota, bibl.; poŝta ĉefof. F. Votrubeč, revuisto; ferv. ĉefof. J. Nový, arhiv.

Ĉeĥoslovakaj kantoj en Esperanto. »La Progreso« eldonos nunjare kantarono de tradukitaj ĉs. naciaj kantoj. Niajn amikojn kaj kunlaborantojn ni petas helpi al ni en la kolektado kaj tradukado de la kantoj!

La IV. Aŭstralia Esp. kongreso okazos dum Pentekosto en Sydney.

La XIV. kongreso de Britaj esperantistoj okazos de 18.—22. majo en Bournemouth.

La XVIII. Skota kongreso esp. okazos de 15.—17. junio en Greenock.

Pri granda ĝojo de la maigrandaj. »Rondeto de esperantistinoj« en Praha aranĝis 11. feb. t. j. publikan amuzkunvenon por esperanta klaso de f-ino J. Šupichová en domo »Legie maĝoh«. aL partopreno estis ne atendita, grandeca. Venis la gepatroj de lernantaj knabinoj, venis iliaj parencoj kaj konatuloj, plej parte neesperantistoj — kaj ĉi tiu fakto multe signifas por la propagando. Nur kelke da anoj de »Esp-ista Klubo« en Praha partoprenis la intiman kunvenon, inter ili s-o la prez. de CAE. I. Eiselt, s-o kons. Koutek, s-o lektoro de esp. Pitlik, s-o red. Bouška kaj ankaŭ s-o Pech el Plzeň kun sia familio. La programon malfermis prezidantino de la »Rondeto« f-ino J. Šupichová per bonveniga parolado, poste paroladis (ĉefe) s-ino A. Jehlíková, direktorino de la supera popola lernejo en Praha VII., »U studánky«, kie la kurso por 36 dekkvarjaraj knabinoj okazas. Ŝi trafemenciis, ke esperanto estas grava kultura faktoro kaj esprimis la ĝojon, ke en ŝia lernejo oni komencis en Praha instrui esperanton. Nun sekvis la prologo de lernantino Richterová. Je fino ŝi entuziasme vokis: »Malgranda estas nia faro, sed granda estas nia amo por nia bela esperanto!«

La junaj esperantistinoj prezentis vere bonan kantistan foron, kiu sub gvidado de f-ino instr. Trojanová (el la sama lernejo kaj ankaŭ esperantistino) kantis — laŭ ĉies juĝo — tre bele kelkajn esper. kaj ĉefajn kantojn. Aparte kantis 2 lernantinoj: Součková kaj Svobodová la duvoĉan »Vivu esperanto!« kaj lernantino Kračmerová deklamis poemon de M. Hankel »Verda stelo«. aL plua parto de programo estis: Ritmaj dancoj, klavir-ludado, deklamo de parto de »Ifigenio de Taurido« kaj parolado de f-ino J. Šupichová »Rememoro je bona homo«, en kiu ŝi priskribis la vivon kaj laboron de nia Majstro. Kafo — teo trinkado — kaj jen la f-ino de la amuzo, kiu tiom feliĉigis la junajn novajn samideaninojn, kiuj ĉiuj promesis »fariĝi veraj samideanoj kaj helpi en propagando al estimataj samideanoj, kiujn persone ekkoni ili povis dum tiu ĉi, por ili neforgesebla tago!« —us—

XIII. orientbohema laborkunsido Esperantista. Nia kara lingvo ĝis nun sonas en mia kapo, ĝis nun mi sentas manpremon de spiritaĵ gefratoj. Nia XIIIa, kvankam ĝi okazis en urbo ĉe limo de nia regiono, bonege sukcesis. Unue ni, Jiĉin'anoj, ricevis grandegan subtenon en nia pionira laboro, due ankaŭ ceteraj, denove renkontante sin, gajnis novan forton. Ŝajnas al mi senutile paroli pri tiuj orientbohemiaj laborkunsidoj, ĉar ĉiu konas, ke tiam kunvenas anaro de laboristoj de l' sankta ideo Zamenhofa. Do, sole kelkaj vortoj. Ni nespertaj laborantoj faris ĉion eblan por kontentigi karajn gastojn, kiuj certe senkulpigos iun malagrablajon. Ni, amuzante per muziko, kantado kaj deklamo, komencis tiun festeton per ofero al Terpsychore. Morgaŭon ni matene, iomete malfrue ellitiĝinte, trairis la urbon. Post refreŝigo de stomakoj komencis laborkunsido, kies prezidanto estis s-ro Nosek, kiel protokolistoj funkciiis s-oj Šikl kaj Mareš. S-o Šikl, protagonisto de ĉi tiea movado, bonvenis ĉeestantaron kaj s-rojn: urbestron V. Jirů kaj Lemberk, reprezentanton de loka YMCA. Am-

baŭ sinjoroj montris veran komprenon por nia afero kaj certigis nin pri ilia kunhelpo. (Ni ĝojos!) Post raporto de regiona afergvidanto s-ro Otto Sklenčka kaj juna samideano el Trautenau, entuziasma junulara laboranto, oni pridiskutis kelkajn interesajn aferojn. Ĉiu bedaŭras, ke CAE. ne sendis reprezentanton, kvankam tiuj el CAE. tion promesis. Resume: Ĉio bone sukcesis kaj ni, orientbohemiaj Esperantistoj, estas fieraj, posedante tiel agemajn gvidantojn. Elektinte novan »kongresurbon«, ni adiaŭis kun entuziasmo: Ĉis la revido en Nymburk! Mi finas per vortoj aŭditaj dum fermo de kunsido:

La temp' de l' ĝojo estas for,
kaj per ĝi plenplenigita kor,
denove vokas varme ĉien:
Neniam alie ol antaŭen!

Bobe.

Esperanto en la komerco. La unua kongreso de la brazilaj komercaj asocioj, okazinta en Rio de Janeiro, aprobis unuanime la jenan rezolucion: »La Kongreso de Brazilaj Komercaj Asocioj decidis konsili la instruadon de Esperanto en la komercaj lernejoj kaj la uzadon de tiu helpa lingvo en la rilatoj kun la eksterlandaj komercaj ĉambroj.« — La dua amerika kongreso de ekonomia disvastigo kaj komerca instruado, ankaŭ okazinta en Rio de Janeiro, unuanime aprobis la jenan rezolucion: La dua amerika kongreso de ekonomia disvastigo kaj komerca instruado montras la neceson enmeti en la programojn de la komerca instruado de ĉiu amerika lando la lingvon Esperanto, por faciligi la komercaj rilatoj.«

Sepa brazila kongreso de Esperanto. Laŭ decido de Brazila Ligo Esperantista okazos en Rio de Janeiro de la 9a ĝis la 14a de marto 1923 la sepa brazila kongreso de Esperanto, kiel memorigo de la 1n centjara datreveno de l' sendependenco de Brazilio. La ministro de l' publikaj laboroj permesis, ke la Organiza Komitato telegrafu senpage ĉien en Brazilio.

ooo

NEKROLOGOJ.

S-ino J. Nováková.

En Praha mortis la 28. feb. sinjorino Josefa Nováková, edzino de horlogisto Fr. Novák, fervora kaj oferema membrino de Esperantista Klubo en Praha. La enterigo okazis la 3. de marto en la tombejo de Olšany, kie la esperantistoj, reprezentantaj la lokajn esp. societojn, adiaŭis de ŝi per dankoplenaj vortoj. La esperantistaro perdas en ŝi senpartian amikino de ora koro, kies nomo estas firme ligita kun la sukceso de la XIII. Universala Kongreso de Esp., al kiu ŝi — preskaŭ unusola el la membrinoj de Esp. klubo de Praha — dediĉis ĉiujn siajn fortojn. La loka kongresa komitato kaj la Esp. klubo de Praha metis sur ŝian ĉerkon florkronon. La 2. de marto preparolis prezid. s-o Eiselt ŝiajn poresperantajn meritojn en la kunveno de E. K. de Praha. — Al nia fervora kunbatalanto s-o Fr. Novák ni esprimas sinceran kondolon kaj tutkoran bedaŭron pro la dolora perdo.

S-ro J. W. Sevenhuijsen.

Kun bedaŭro ni anocas la morton de S-ro J. W. Sevenhuijsen, Haarlem, kiu okazis la 10an de februaro. S-ro Sevenhuijsen, kiu estis konata figuro en la internaciaj kongresoj, estis unu el la plej fervoraj pioniroj de Esperanto kaj precipe laboris por

la enkondukado de Esperanto en la lernejojn. Li estis prezidanto de la Internacia Asocio de Instruistoj, prezidanto de la Esperantista Vegetara Ligo, kaj unu el la honoraj prezidantoj de la Internacia Konferenco de Instruistoj, kiu okazis en Genevo lastan jaron, je kiu li estis oficiala reprezentanto de la Nederlanda Ministerio de Publika Instruado. Li estis aŭtoro de lernolibro por infanoj (holanda-esperanta), kiun li ilustris per multaj geniaj desegnaĵoj por instrui per la okulo la prepoziciojn, la korelativojn, kaj la kunmetitajn tempojn de la verko; kaj ankaŭ per originala muziko por kantado. Li loĝis en ĉarma Esperanta hejmo en la ĉirkaŭaĵo de Haarlem, kun pitoreska kanalo antaŭe kaj bela hiacinta kampo malantaŭe, en kiu li kaj lia afabla edzino kaj gracia filino Nelly montris gastamon, kiu estas kara memoro por ĉiuj, kiuj estas feliĉaj esti liaj estintaj gastoj. Al liaj familianoj kaj al la Nederlandaj esperantistoj ni sendas niajn simpatiajn kondolojn.

W. P. M.

LABORISTA LIGO ESPERANTISTA.

(La raportojn por tiu ĉi rubriko oni sendu plej malfrue ĝis la 10. de ĉiu monato al k-do J. P e c h, Plzeň, Houšková ul. 4.)

Laborista Ligo Esperantista en Ĉeĥoslovakujo, centro en Plzeň, havis sian unuan ĝeneralan kunvenon dimanĉe la 18an februaron en asocia domo »Nebe«, dum ĉeesto de ĉiuj delegitoj el sekcioj de la Ligo. La ĝeneralan kunvenon salutis multe da reprezentantoj de lokaj eĉ eksterurbaj institucioj, dezirante al ĝi plenan sukceson en plua fervova laboro sur la kampo de la internacia ideo. Por urbestraro de urbo Plzeň ĉeestis s-ro inĝeniero A. Winter, kiu trafe akcentis la signifon de la internacia lingvo Esperanto kiel el teoria vidpunkto, tiel ankaŭ el la praktika, precipe por mezkleraj homoj de ĉiuj nacioj, konstatante, ke ĉi tio ĝenerale estas per si mem la evolua elemento de psika scio ĉe mezklera homo. Per belegaj vortoj li certe fervorigis la novajn klopodojn al plua laboro ĉe ĉiuj ĉeestintoj, kiuj rekompencis lin per varmezaj simpatioj. Reprezentanto de »Laborista Akademio« kaj Laborista gimnastika unuigo Vojt. Babický salutis la ĝeneralan kunvenon per Esperanto kaj parolis per belegaj vortoj pri la utileco de Esperanto por laborista gejunularo, kion atestas la fakto, ke ili akceptis Esperanton kiel helpan lingvon por interrilati parole eĉ skribe kun Lab. gimn. asocioj de la tuta mondo. La salut-leteroj kaj telegramoj alvenis el ĉiuj flankoj de Ĉeĥoslovakujo, eĉ el eksterlando, kiuj pro malfruiĝo alvenas ankoraŭ nun. Kiel prezidanto de la Ligo estis denove elektita k-do J. Pešek, kiu reale priskribis al ĉeestintoj la laborajn celojn de venontaj taskoj, dankante al ili por la ĝisnuna kunhelpo. Pro grandaj meritoj je Esperanta movado en Ĉeĥoslovaka okcidento estis elektita k-do Jos. Pech kiel dumviva honora prezidanto de la Ligo, kiu kore dankis pro farita al li honoro, promesante pluan kunlaboron. Poste sekvis debato, post kiu kun fervoro de ĉiuj ĉeestintoj la ĝenerala kunveno finiĝis.

Sekcio Plzeň I. malfermis 5an de januaro novan kurson por komencantoj, kiu okazas en legejo de »Laborista Akademio«, laborista domo »Peklo«. La kurso, al kiu aliĝis 31 gelernantoj, estas gvid-

ata de kamarado J. Pech ĉiuvendrede de la 7—8 horo vespere.

Suomi, lando de mil lagoj, estas temo de la parolado, kiu okazos sabate 24 an de marto je la sepa vespere en halo de urba muzeo Plzeň. La parolado estos nur en lingvo esp., tial ni ĉefe atentigas ĉiujn samcelanojn el Plzeň kaj ĉirkaŭaĵo veni multnombre kaj subteni movadon de lingvo internacia. Kamarado J. Pech, kiu pretigis 160 lumbildojn nature koloritajn, gvidos nin el Plzeň tra Germanujo, trans Baltika maro al la XIVa. Poste ni ekvidos diversajn mirindaĵojn el Finnlando, naciajn kostumojn ktp., kiujn li fotografis dum sia kelksemajna ĉeesto en Finnlando. La enirbileto 2 Kč. La gajno estos donacita por aĉeto de libroj al biblioteko de sekcio Plzeň I.

DEZIRAS KORESPONDI.

(La enpresojn kostas 2 Kč.)

(Klarigo: kor. = korespondas, int. = interŝanĝas, L. = leteroj, I. K. = ilustritaj kartoj, P. M. = poŝtmarkoj, G. = gazetoj, S. M. = sigelmarkoj.)

Kioto (Japan, Kitaŝirakaŭa. — S-o Küč Šinoda dez. interŝ. Pm. kaj Pk.

Dělní Jitřin u Mostu (Ĉ. S. R.), Důl Humboldt II. — S-o Vojtěch Růžička, oficisto, dez. interŝ. Pm. kaj Pk. el tuta mondo.

Velké Hamry (Ĉ. S. R.) N-o 19. — S-o Lud. J. a k o u b ě, slosisto, koresp. per L. kaj Pk. kun laboristoj en- kaj eksterlandaj.

Selo Usole (Siberujo), Bazarna ul., Irkutskaja gub., Bolŝaja. — F-ino Luba Voroncova, dez. koresp. per L. kaj Pk.

Selo Usole (Siberujo), Irkutskaja gub., Bolŝaja. — S-o Konstantino Slobodĉikov interŝ. Pk.

Esperanta unuigo kaj Klubo de fotografoj amateroj en Červený Kostelec aranĝas dum Pasko de la 29a marto ĝis la 2a aprilo 1923 en knaba lernejo

GRANDAN EKSPozICION

Tiu ĉi ekspozicio surprizos ĉiun vizitanton per riĉeco de kolektoj, kiuj plenigos tutajn 3 ĉambrojn. Simila, grandampleksa ekspozicio ankoraŭ en tuta nordorienta Bohemujo ne okazis.

Via horloĝo funkcios precize se vi ĝin donos por rebonigi al

FR. NOVÁK, horloĝisto en Praha I. Malé nám. 10.

Horloĝoj. - Juveloj. - Esp. insignoj de esp. klubo en Praha. - Esp. glumarkoj, kolekto da 12 div. specoj, 100 pecoj Kč 4-, afrankite Kč 5-, 1000 pec. Kč 35-, afrankite Kč 37-50.



Eldonanto: Esperantista klubo en Plzeň. — Responda redaktoro: B. Tittl, Plzeň, Radyňská ul. 10. Presis laborista presejo, Plzeň.